

Jen konstruaĵo tre ŝatata de belgoj.

Fiefs, la plej alta punkto de Artezo (193 m) estis multe bombita dum la dua mondmilito, pro la V1-katapultoj kuŝantaj apud la vojo al Febvin. El tiu bombado rezultis multe da detruitaj konstruaĵoj, inter kiuj la preĝejo.

La unua preĝejo rekonstruita en Pas-de-Calais post la milito estis tiu de Fiefs, en 1956/1957.

Pro la riĉeco de la vilaĝo meze de la 16-a jarcento, la malnova preĝejo estis tre ampleksa, do la militkompensoj ricevitaj post la mondmilito estis tre imponaj. Tial, la arkitektoj ne estis ĉi-foje briditaj pro manko de mono, kiel okazis tiel ofte! Henri Frey imagis nekutiman trapezforman konstruaĵon, en kiu la lumo estas direktita al la ĥorejo (pri kio ni klarigos ĉi-sube). Li elektis ferbetonon, kaj multkoloran ŝtonon el Baincthun (kies ŝtonmino estas nun fermita). La sonorilturo altas 30 metrojn.

La navo:

Kiam oni eniras en la preĝejon, la rigardo tuj direktiĝas al la ĥorejo. Laŭ la arkitekto, la apenaŭ lumigata navo devas estigi pacan etoson, kaj instigi al meditado. Tion ebligas la vitraloj de Gabriel Loire. Unuavide ili ŝajnas esti nur abstraktaj, sed ili fakte havas apartan lumigan efikon. Ili konsistas el malglataj vitraj blokoj enŝovitaj en cementon, kaj fortranĉinte pec(eg)on el ĉiu bloko la artisto sukcesis direkti la lumon al la ĥorejo.

Kiam de la ĥorejo oni rigardas al la portalo, videblas en la vitraloj ĉiuj simboloj de la religio : monogramo, ankro, kolombo, fiŝo, kaliko, vinberoj, spiko de tritiko... Tiujn simbolojn desegnis Henri Frey kaj realigis Gabriel Loire.

La arkitekto desegnis ankaŭ la seĝojn, la konfesejon, la ambonon, la seĝon kaj taburetojn de la celebrantoj, la tabernaklon, kaj la altaron, kiuj estis poste realigitaj de metiistoj.

La altaro:

Kvankam la rekonstruado okazis antaŭ la dua koncilio de Vatikano (1962), la arkitekto opiniis, ke la altaro devas esti la ĉefa parto de la preĝejo, do li starigis ĝin meze de la ĥorejo. Tial post la koncilio necesis neniu ŝanĝo. La ligna statuoj de Sankta Ĝermano jam staris en la antaŭa preĝejo, sed la krucifikso estis forlasita en la malnova tombejo...

La baptofontoj:

En la 16-a jarcento, nur baptitoj rajtis eniri la preĝejon. Tial estas flankaj pordoj por rekte atingi la baptofontojn, kiuj staras en kuveto kahelita per blua kahelaro rememoriganta la akvon de la rivero Jordano, en kiu Jesuo estis baptita. Post la bapto, la nova kristano eniras la preĝejon tra mirinda krado el forĝita fero. Tie ni povas admiri la statuon de Sankta Johano la Baptisto skulptitan de Jean Lambert-Rucky, kaj la flavan lumon de la vitraloj de Gabriel Loire.

La statuoj de Jean Lambert-Rucky:

J L-R estis slovendevena. Li partoprenis en la restaŭrado de bizancaj mozaikoj. Li konservis la influon de tiu mezorienta arto, kiun ni retrovas en la formoj kaj koloroj de liaj artaĵoj. Liaj skulptaĵoj estis faritaj el diverskolora cemento. Bedaŭrinde la koloroj iom post iom velkis, sed Daniel Boutry, kiu partoprenis la konstruadon de la preĝejo, sukcesis antaŭ kelkaj jaroj redoni al la statuoj iliajn originajn kolorojn.